

## ĈEA-retkomunikoj 2/2012

ĈEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonaĵojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

Enhavo:

1. VORTOJ DE ĈEFREDAKTORO
2. STARTO 2012/2 ĴUS APERIS!
3. TRILANDA KONFERENCO EN BŘECLAV
4. 6-A KONGRESO DE ASOCIO DE ESPERANTISTOJ-HANDIKAPULOJ
5. VENU KUNE FESTI 60-JARIĜON DE ESPERANTO-TENDARO EN LANĈOV!
6. NOVA TUTJARA EKSPozICIO „125 JAROJ DE ESPERANTO“
7. MIGRA EKSPozICIO "Ĉu esperanto estas morta lingvo?" EN JULIO EN BRNO
8. AKTUALAĴOJ EN [WWW.ESPERANTO.CZ](http://WWW.ESPERANTO.CZ)
9. NOVAĴOJ EN <http://muzeum.esperanto.cz>
10. LISTO DE ARANĜOJ
11. BONDEZIROJ

### 1. VORTOJ DE ĈEFREDAKTORO

Venis somero kaj venas ankaŭ nova eldono de ĈEA-retkomunikoj. Tiun ĉi eldonon mi kompletigis ne en mia hejmo, sed en restoracio apud Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, kiu nunjare festas 60-jariĝon. Ne tiom jubilea, tamen ankaŭ grava, estas fakto, ke nunjare okazos la 15-a renkontiĝo de iamaj partoprenintoj. Do, se vi ne havas ion por fari dum duono de aŭgusto, venu al Lančov ĝui belan naturon, iom naĝi en proksima digolago kaj diskuti pri estonteco de tiu ĉi tendaro. Ne forgesu ankaŭ aliĝi al trilanda konferenco en Břeclav, la unua limdato estas la 4-an de julio 2012. Belan legadon!

PS: Ŝparu naturon - se eblas - ne printu tiun ĉi eldonon de ĈEA-retkomunikoj, se ne nepre necesas :) Estu amiko kun la naturo!

Ankaŭ tiu ĉi eldono aperas en PDF - elŝutu el adreso: <http://miropiro.wz.cz/retkomunikoj-2012-2.pdf> (eksterordinare ne eblas nuntempe la PDF-version elŝuti el [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) - sed post mia reveno de Lančov eblos trovi en [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) la PDF-version kiel kutime).

### 2. STARTO 2012/2 ĴUS APERIS!

En elektronika formo en PDF-formato vi povas ĝin elŝuti kaj legi klakinte al ĉi-tiu ligilo: <http://www.literatura.bucek.name/starto212.pdf>

### 3. TRILANDA KONFERENCO EN BŘECLAV

Ne forgesu aliĝi al Trilanda konferenco en Břeclav (27.-30.9.2012) - komuna aranĝo de ĉeĥaj, slovakaj kaj aŭstraj esperantistoj!

Ĝis 7.7. (fakte pro festoj nur ĝis 4.7.) estis prokrastita la unua aliĝperiodo. Post tiu dato kun 50,-Kč krompago! Krom labora traktado,

seminarioj kaj kulturaj programoj preparatas ekskurso al Lednice, kaj partopreno en Sanktvenceslaa urba solenaĵo.

Informoj kaj aliĝilo troviĝas en <http://www.esperanto.cz/eo/akce/trilanda-konferenco-443.html>

Kontaktadreso por aliĝiloj: [vhirsx@email.cz](mailto:vhirsx@email.cz)

#### 4. 6-A KONGRESO DE ASOCIO DE ESPERANTISTOJ-HANDIKAPULOJ

Ĝis 25.7.eblas aliĝi al kongreso de AEH, okazonta 13.-16.9.2012 en ripozejo, okazonta en ripozejo Štíří důl ĉe Krucemburk (regiono Vysočina).

Ankaŭ nemembroj kaj nehandikapuloj kompreneble bonvenas! Prelega, ekskursiva, kultura kaj amuza programo. Kompletita partoprenkotizo (programo, loĝado, manĝoj, busekskurso) estas 1.760,- CTZK (85 eŭroj). Detalaj informoj kaj aliĝilo elŝuteblas en <http://www.esperanto.cz/cs/akce/6-sjezd-aeih-477.html> (ĉeĥlingve, por ĉeĥoj) kaj en <http://www.esperanto.cz/eo/akce/la-6-a-kongreso-de-aeih-454.html> (por eksterlandanoj)

#### 5. VENU KUNE FESTI 60-JARIĜON DE ESPERANTO-TENDARO EN LANĈOV!

10.-12.8. kiel tradicie kunvenos partoprenintoj kaj geamikoj de la tendaro, ĉi-foje eĉ okaze de grava jubileo! Ne maltrafu renkonti viajn malnovajn konatulojn! Ankaŭ novuloj bonvenas! Organiza kotizo + 2 tranoktoj en la kabano 300,- Kč, tuttaga manĝado por 2 tagoj 245,-Kč. Informiĝu kaj aliĝu ĉe: [olgalacinova@seznam.cz](mailto:olgalacinova@seznam.cz)

#### 6. NOVA TUTJARA EKSPozICIO „125 JAROJ DE ESPERANTO“

Nova tutjara ekspozicio „125 JAROJ DE ESPERANTO“ estis inaŭgurita la 2-an de junio en Esperanto-Muzeo en Svitavy. Krom ĝeneralaj tendencoj ĝiprezentas ankaŭ Zamenhof/Esperanto-objektojn, informojn pri famuloj kaj Esperanto, vivsortojn de persekutitaj esperantistoj, sed ankaŭ diversajn historiajn kuriozaĵojn kaj unikaĵojn. Ampleksa libroekspozicio dokumentas riĉan evoluon de Esperanto-literaturo. En la muzea komputilo eblas spekti kaj eĉ elŝuti al poŝmemorilo kaj forporti hejmen centojn da novaj aŭdvidaj dokumentoj. Por viziti la muzeon, anonciĝu en kaso de la vid-al-vida Urba muzeo kaj galerio. Enirpago estas simbolaj 10 CZK. Adreso kaj malfermohoroj troveblas en <http://muzeum.esperanto.cz/eo/kontakt>. Ni antaŭĝojas vian viziton!

#### 7. MIGRA EKSPozICIO "Ĉu esperanto estas morta lingvo?" EN JULIO EN BRNO

2.-20.7. la ekspozicio estos la unuan fojon en Brno - en Moravia landa biblioteko (Moravská zemská knihovna), Kounicova 65

<http://www.esperanto.cz/cs/akce/putovni-vystava-je-esperanto-mrtvy-jazyk-529.html>

20.-30.7. en Administra kaj kleriga centro de Sudmoravia regiono (Admin. a vzdělávací centrum Jihočeského kraje), Cejl 73

<http://www.esperanto.cz/cs/akce/putovni-vystava-je-esperanto-mrtvy-jazyk-532.html>

Ekde aŭgusto ĝis oktobro la ekspozicio troviĝos en la kastela garbejo (Zámecký špýchar) en Žirovnice.

<http://www.esperanto.cz/cs/akce/putovni-vystava-je-esperanto-mrtvy-jazyk-497.html>

#### 8. AKTUALAĴOJ EN [WWW.ESPERANTO.CZ](http://WWW.ESPERANTO.CZ)

8.1 Artikoloj en esperanto en [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz)

Liberaj studoj ĉe Edukado.net

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/liberaj-studoj-ce-edukado-net.html>

Ebleco de senpaga interreta studado de 7 fakoj lanĉita!

Pri nia Muzea nokto raportis ĉina radio

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/pri-nia-muzea-nokto-raportis-cina-radio.html>

Mini/BMW gratulas Esperanton

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/mini-bmw-gratulas-esperanton.html>

Pola Retradio pri R.U.R.

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/pola-retradio-pri-r-u-r.html>

Nova retejo por naturamantoj

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/nova-retejo-por-naturamantoj.html>

8.2 Artikoloj en la ĉeĥa lingvo en [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz)

Okénko do historie - Esperanto v Máchově kraji

<http://www.esperanto.cz/cs/aktuality/okenko-do-historie-esperanto-v-machove-kraji.html>

Ve Varšavě se bude jezdit "Veturilem"

<http://www.esperanto.cz/cs/aktuality/ve-varsave-se-bude-jezdit-veturilem.html>

Vyšel český překlad knihy o dětské vesničce "Dobrá naděje"

<http://www.esperanto.cz/cs/aktuality/vysel-cesky-preklad-knihy-o-detske-vesnicce-dobra-nadeje.html> kun elŝutebla kompleta ĉeĥa traduko (en

formato PDF)

Kardinál Miloslav Vlk oslavil osmdesátiny

<http://www.esperanto.cz/cs/aktuality/kardinal-miloslav-vlk-oslavil-osmdesatiny.html>

Nový web o mezináboženském dialogu

<http://www.esperanto.cz/cs/aktuality/novy-web-o-mezinabozenskem-dialogu.html>

Počítačová poradna - Jak na Skype

<http://www.esperanto.cz/cs/aktuality/pocitacova-poradna-jak-na-skype.html>

Je libo Kufr z Píseckého jara?

<http://www.esperanto.cz/cs/aktuality/je-libo-kufr-z-piseckeho-jara.html>

du kvizoj pri via scio de ĉiĉerona terminologio

9. NOVAĴOJ EN <http://muzeum.esperanto.cz>

Jaká byla Muzejní noc ...

<http://muzeum.esperanto.cz/cs/expozice/jaka-byla-muzejni-noc.html>

Raporto pri la Muzea nokto

<http://muzeum.esperanto.cz/eo/expozicioj/raporto-pri-la-muzea-nokto.html>

Fotogalerio: Muzejní noc / Muzea nokto

<http://muzeum.esperanto.cz/cs/galerie/30-muzejni-noc-2012-muzea-nokto-2012.html>

Cesta z jazykového babylonu a bahá'í

<http://muzeum.esperanto.cz/cs/expozice/cesta-z-jazykoveho-babylonu-a-baha-i.html>

Jarní setkání ve Svitavách

<http://muzeum.esperanto.cz/cs/expozice/jarni-setkani-ve-svitavach-printempa-renkonti-o-en-svitavy.html> + fotogalerio

<http://muzeum.esperanto.cz/cs/galerie/29-jarni-setkani-ve-svitavach-printempa-renkontigo-en-svitavy.html>

Kiu estis Francisko Valdomiro Lorenz?

<http://muzeum.esperanto.cz/eo/expozicioj/kiu-estis-francisko-valdomiro-lorenz.html>

9.1 Aŭdvidaj novaĵoj en la paĝo de Esperanto-Muzeo ĉe Ipernity

<http://www.ipernity.com/home/181031>

9.1.1 Muziko:

Vladimir Soroka – Din don

<http://www.ipernity.com/doc/181031/12700808>

Mozart – Ave verum corpus (Korpo estu salutita) – kantas M.Smyčka

<http://www.ipernity.com/doc/181031/12537273>

Stefo – Kion vi diris (Depeche Mode):

<http://www.ipernity.com/doc/181031/12436138>

Argentina grupo Strika Tango - La Druido

<http://www.ipernity.com/doc/181031/12354990>

9.1.2 Parola vorto:

Mark Fettes - Esperanto-Ideologio:

<http://www.ipernity.com/doc/181031/12885846> (prelego)

Fabelo de Andersen - Plej Bela Rozo de la Mondo

<http://www.ipernity.com/doc/181031/12570245>

Maoria poemo Elpafu la sagon (en traduko de Tibor Sekelj):

<http://www.ipernity.com/doc/181031/12255145>

9.1.3 Filmetoj:

Fontoj de la „Majstro de l’ringoj“

<http://www.ipernity.com/doc/181031/12933478>

(prelego de A.Löwenstein pri Tolkien)

Dolchamar – La fariseo

<http://www.ipernity.com/doc/181031/12886105> (karakeo)

Bona espero

<http://www.ipernity.com/doc/181031/12724554>

(specimeno el la filmo „Esperanto – la centjara“ de R. Dobrzynski)

Akuzativo (humuraĵo de Monthy Pyton)

<http://www.ipernity.com/doc/181031/12637216>

10. LISTO DE ARANĜOJ

La plej proksimaj aranĝoj

2012-07-01-14, 2012-07-15-28, 2012-07-29-08/10: Tri etapoj de la 59-a Somera Esperanto-Tendaro en Lančov apud Vranov-lago. Info: [info@set-lancov.cz](mailto:info@set-lancov.cz), <http://www.set-lancov.cz>

2012-07-10-15: La 18-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso en Opava kun la ĉeftemo

„Depresio kiel kromefiko de kronikaj malsanoj“. Info: [Eva.Kopecna@ivax-cz.com](mailto:Eva.Kopecna@ivax-cz.com)  
2012-07-14-20: Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK en Svitavy. Tutsemajna aranĝo kun la temo „Sciencfika literatura kaj robotoj“ kaj riĉa turisma kaj kultura programo. Info: [www.kava-pech.cz/iek](http://www.kava-pech.cz/iek) aŭ [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)  
2012-07-14-21: 65-a kongreso de IKUE - en Pécs (Hungario) Informoj: <http://www.ikue.org/kong2012/index.htm>  
2012-07-21-29: Somera Esperanto-Studado. Aranĝo en Slovakio ideala por komencantoj, kun bunta programo. Nunjare denove en Nitra. Pli da informoj kaj aliĝilo ankaŭ en la ĉeĥa lingvo <http://cs.lernu.net/ses/>  
2012-08-10-12: 15-a Renkontiĝo de iamaj partoprenintoj de Someraj Esperanto-Tendaroj en Lančov. Info: [info@set-lancov.cz](mailto:info@set-lancov.cz), <http://www.set-lancov.cz>  
2012-09-08: Postferia renkontiĝo - en Písek, informoj: <http://www.esperanto.cz/eo/akce/la-6-a-postferia-renkonti-o-534.html>  
2012-09-13-16: La 6-a kongreso de AEH-IKEH (handikapitaj esperantistoj) en ripozdomo Štíří důl u Krucemburku (Skorpia valo ĉe Krucenburk). Info: [aeh-ikeh@volny.cz](mailto:aeh-ikeh@volny.cz)  
2012-09-16: Tago de malfermitaj pordoj en Esperanto-Muzeo Svitavy, Info: [dvor.libuse@seznam.cz](mailto:dvor.libuse@seznam.cz)  
2012-09-27/30: Trilanda konferenco - Komuna konferenco de aŭstraj, ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj. Info: [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) aŭ [komitato@esperanto.cz](mailto:komitato@esperanto.cz)  
2012-10-08/14: Aŭtuna lingvoseminario en Skokovy (Bohemia Paradizo) Info: [drahotova@esperanto.cz](mailto:drahotova@esperanto.cz)  
2012-11-08-11: La 1-a Internacia Esperanta Lernejo - en Bartošovice (apud Ostrava), informoj: <http://www.esperanto.cz/eo/akce/la-1-a-internacia-esperanta-lernejo-531.html>  
2012-11-15-18: KAEST (Konferenco pri apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko), nunjare denove en Modra-Harmónia. Informoj kaj aliĝilo: <http://kaest.ikso.net/>  
2012-12-08: AnkRo - Antaŭkristnaska renkontiĝo. Okazloko en Písek, Informoj: <http://www.esperanto.cz/eo/akce/ankro-anta-kristnaska-renkonti-o-484.html>  
2012-12-09: Marcipana Kristnasko en Svitavy, Info: [dvor.libuse@seznam.cz](mailto:dvor.libuse@seznam.cz)  
2012-12-29: Esperanta Silvestro en Česká Třebová

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed sendu la informon pri ĝi al [miropiro2312@gmail.com](mailto:miropiro2312@gmail.com) (atentu la novan retadreson!). Ne eblas envicigi aranĝon, pri kiu ni ne scias.

Atentu, ke la plej ampleksan kalendaron de Esperanto-eventoj en la tuta mondo, sed ankaŭ plurajn utilajn informojn, vi trovos ĉe [www.eventoj.hu](http://www.eventoj.hu)

## 11. BONDEZIROJ

Nome de la redaktokonsilio de ĈEA-retkomunikoj kaj ankaŭ propranome mi deziras al ĉiuj abonantoj de la ĈEA-retkomunikoj agrablan someron.  
Miropiro (Miroslav Hruška), redaktoro de ĈEA-retkomunikoj

ĈEA-RETKOMUNIKOJ 2012/2

Kontakto kun ĉefredaktoro: Miroslav Hruška – [miropiro2312@gmail.com](mailto:miropiro2312@gmail.com)

Redakta teamo: Petr Chrdle, Pavla Dvořáková, Marek Blahuš